PSALMO DE LA DIA MIZERIKORDO

Sekva teksto estas frukto de iu paroĥa spirita renovigo je temo: „Vizaĝo de la Mizerikordo“...

I.

Triunua Dio estas eterna – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Li kreis ĉielon kaj teron kaj ĉion, kio estas sur ili – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Li kreis homon kiel sian bildon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Li donis al homo nemorteblan animon kaj racion – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Kiam homo unuan fojon pekis, Li promesis al li Savanton – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Dio kondukas sian popolon kaj savas ĝin el manoj de malamikoj – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Li edukas homon, por ke li al Li senlime fidu kaj amu Lin – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Dio montras al homo vojon al savo kaj donas al li Dekalogon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Siatempe Li elektas sanktan Virgulinon, kiu koncipos Savanton – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Maria iĝas brilanta Matenstelo de la savo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Dio Patro konfidas sian Filon al prizorgado de zorganto Jozefo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Tri jaroj sufiĉis al Dia Filo, por konverti korojn de multaj homoj – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Antaŭe, ol la Dia Filo devis suferi, Li estigis Eŭkaristion, fonton de la spirita forto – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Ekde tiu tempo, kiu kun fido manĝas kaj trinkas lian Korpon kaj Sangon, tiu havas la eternan vivon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Dia amo iris ĝis ekstremo kaj lasis sin krucumi – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Sed Dio estas Venkinto super peko kaj morto kaj la trian tagon Li resurektis – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Tiel Li kulminigis verkon de la savo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Sed diablo ne rezignas kaj batalo pri homaj animoj daŭras ĝis la fino de la mondo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Tiu, kiu sukcesos, akiros eternan vivon – Lia mizerikordo daŭras eterne.



II.

Eĉ se multaj rifuzas kredi je ununura Dio en tri personoj: la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homo havas rezervojn kontraŭ Dia ordo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se malamo rilate al aliulo regas en homaj koroj – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homa malprudento neniigas animon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se estas Jesuo Kristo, Filo de Dio kaj Savinto de la mondo, de homoj rifuzata – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homo pro sia fiero rifuzas Dian helpon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se el la vivo malaperas kredo kaj amo je Li – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se estas nekateneble malrespektataj

Diaj leĝoj kaj ĉio, kion Dio destinis kiel naturan – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se la honoro al Patrino de Dio estas malrespektata kaj malgrandigata – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homo forgesas, ke Maria estas plej bona Akompanantino kaj Helpantino survoje al savo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se estas malrespektataj agoj de spirita kaj korpa mizerikordo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se multaj homaj vortoj vundas – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se la sankta meso, fonto de senfinaj spiritaj gracoj, ne estas centro de spirita vivo de homo – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se estas Korpo de Jesuo malhonorigata per neinda sankta komunio kaj per nekredo je Lia reala ĉeesto – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se la suferon oni malfacile tolerportas – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homo malesperas kaj vivas en malespero – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se homo obstine rifuzas Dian gracon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se diablo ofte en homaj koroj venkas – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Eĉ se multaj pro siaj nepentitaj mort-pekoj kaj malmolkoreco rilate al Dio atingos eternan damnon – Lia mizerikordo daŭras eterne.

III.

Feliĉo estu al ĉiu, kiu paŝas sur vojoj de Triunua Dio, serĉas lian vizaĝon kaj amas Lin per tuta sia koro, per tuta sia animo kaj per tuta sia menso, ĉar – Lia mizerikordo daŭras eterne.

Sed ve al tiu, kiu fiere la Triunuan Dion rifuzas, ne pentas pro siaj pekoj kaj aŭdace fidas je Dia mizerikordo ĝis lasta momento de sia vivo, eĉ se – Lia mizerikordo daŭras eterne. Malĝoja estas fino de tia homo, ĉar al li ne estas permesite travivadi eternajn feliĉegojn en la ĉielo, eĉ se – Dia mizerikordo daŭras eterne.

Sed feliĉa estas tiu, al kiu pro lia pentofaro estis pardonita malvirto kaj kies peko estis kovrita; li ĝoju , ĉar al li apartenas Dia regno, ĉar li permesis, ke sur li manifestiĝu – Dia mizerikordo, kiu daŭras eterne. ■

Mgr. Daniel Dehner